AKTUALA ESPERANTO - INFORMILO MONATA DE LA ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO

N° 08 / 2010 Aŭgusto

# aktuala ESPERANTO



35-a ELDONJARO

Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de **Esperantista Brusela Grupo**, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "*reĝa*" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 ; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com, informas Hélène Falk-Bracke +32 2 3584214, helene.falk @ skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

**Eltiro 200 ekzempleroj**. Informoj : ... http://users.belgacom.net/EBG ; ebg.skynetblogs.be ; xurb.leadhoster.com ; esperanto.net ; esperanto.be; lernu.net; uea.org; liberafolio.org ; eo.eventeo.net ; sites.google.com/site/ebgaktuala; sites.google.com/site/panb2001

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

## ENHAVO

Paĝo 2 - Elstara esperantisto Lee Chong-Yeong
Paĝo 3 - Jacob Hasbun tradukis Araban Noveleton 16
Paĝo 5 - Emīlija Vāvere kaj Alberto Garcia Orive poemas
Paĝo 6 - Komitato de UEA elektis en UK de Havano
Paĝo 7 - Kerstin Rhodin raportas pri Rusia Kongreso, St.Peterburgo
Paĝo 10 - André Demarque pri KuKo, kurso por komencantoj 2010
Paĝo 12 - Lee Jung-Kee finprelegas en Ulanbatora 6a Azia Kongreso
Paĝo 13 - Paola Tosato pri Rusia Kongreso kaj ankaŭ Postkongreso
Paĝo 14 - Herman Deceuninck pri biciklu ni el stacidomo de Binche
Paĝo 15 - Esperantaj Eventoj kaj diversaj kongresoj tra fotaĵoj

## PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

**Julio kaj Aŭgusto 2010**

**grupo ferias ek de merkredo 30 Junio ĝis merkredo 8 Septembro**

**Septembro 2010**

15 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci
22 Bernard-Regis Larue pri astronomio *(konfirmenda)*
29 Marc Demonty pri signifo de niaj sonĝoj (revoj)

**Oktobro 2010**

6 Marcel Delforge pri lia vojaĝo trans Siberio
13 Semajna kunveno
20 Diemante Aniĉiene pri historio de Litovujo
27 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci



## ELSTARA ESPERANTISTO LEE CHONG-YEONG

Lee Chong-Yeong naskiĝis la 13-an de februaro 1932 en Samcheonpo, Koreio.





Li studis ĉe la universitatoj Yeungnam (Koreio), Havajo kaj Harvard (Usono) kaj doktoriĝis pri komerca ekonomiko en la Universitato de Kobe (Japanio). Dum sia profesia kariero li estis ĉefo de la merkatuma grupo de la UN-organizo pri Nutraĵo kaj Agrikulturo, kaj profesoro de la Kyungpook Ŝtata Universitato (Korea Respubliko). Li estis ĉefkonsilanto de la Korea Industria kaj Evoluiga Instituto, gastprofesoro de la Universitato de Kobe, honora profesoro de la Nankaj-Universitato (Ĉinio) kaj orda profesoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino. Nur tri azianoj okupis la prezidanteco de UEA, unue la japano Hideo Yagi de 1962-1964, due la koreano Lee Chong-Yeong 1995-1998 kaj trie la barato Probal Dasgupta de 2007 ĝis nun. Lee Chong-Yeong lernis Esperanton autodidakte en 1948. Li estis prezidanto de Korea Esperanto-Asocio (1994-95, 1998-2001), prezidanto de UEA (1995-1998) kaj vicprezidanto de UEA (2001-2004). Kiel prezidanto de UEA li distingiĝis kiel dinamika kaj iniciatema gvidanto, kies plena sindediĉo al Esperanto, sincereco kaj persona ĉarmo faris lin amata de ĉiuj. Li kuniniciatis la unuan Nitobe-simpozion en la Universala Kongreso en Prago en 1996 kaj la Manifeston de Prago, kiu, subskribita de pli ol 13000 esperantistoj, restas gvida dokumento pri la celoj de la Esperanto-movado.

En 1996 prezidanto Lee lanĉis Kampanjon 2000, kiu kune kun la Manifesto de Prago katalizis senteblan pliaktivigon en UEA kaj la cetera movado. Lee Chong-Yeong verkis 'Esperanto en la 21-a jarcento' (2001), 'Esperanto, la lingvo de la 21-a jarcento' (en la korea, 2001), 'Esperanto kaj internaciaj organizaĵoj' (2003) kaj '80-jara historio de la korea Esperanto-movado' (en la korea, 2003), 'Ridante lernu' (2007), kaj 'Elektitaj Zamenhofaj proverboj' (2008). Li ankaŭ havis esencan rolon en la estigo de la Esperanta eldono de 'Historio por malfermi estontecon' (2007), libro pri la moderna historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio.

En 2004 Lee Chong-Yeong estis elektita honora membro de UEA pro liaj elstaraj meritoj por UEA kaj tutmonda Esperanto-movado. Li estis ankaŭ honora prezidanto de Korea Esperanto-Asocio. La Ĉina ŝtato dekoraciis lin per la Medalo de Entuziasma Subteno de Konstruo kaj Kunlaboro por Ĉina Amikeco, kaj la prezidento de Vjetnamio per la Medalo de Entuziasma Subteno por la Vjetnama Esperanto-Movado. Lee Chong-Yeong forpasis post elĉerpa malsano en Koreio la 4-an de julio 2008 en la aĝo de 76 jaroj. La funebra ceremonio okazis ĉe katolika preĝejo Su Seong, en urbo Taegu (Koreio) la 7an de julio.

(vidu ankaŭ Aktuala 2008/5)

## ĈEVALON BUĈI

En la farmbieno la ĉevalo malsanas. La bestkuracisto diras al la kamparano: ***Mi injekcias kuracilon, sed se post tri tagoj la ĉevalo ne resaniĝos, bedaŭrinde ni bezonos buĉi lin.*** La porko ĉion aŭdis kaj diras al la ĉevalo: ***Starigu!*** Sed la ĉevalo estas tro laca pro malsano. La duan tagon la porko diras al la ĉevalo:***Starigu rapide!*** Sed la ĉevalo estas ĉiam ankoraŭ tro laca. La trian tagon la porko krias al la ĉevalo: ***Starigu nepre aŭ alimaniere ili buĉigos vin!*** Do tiam la ĉevalo penas lastan egan provon kaj apenaŭ suksesas stariĝi. Feliĉa la kamparano decidas: ***Ni bezonas festi, ni buĉos la porkon!***

**Moralaĵinstruo:** ***Porko, okupiĝu pri viaj aferoj kaj fermu buŝon!***

## NOVELETO 16 *(7a-13a jarcentoj)*

Ibnu-l-Husajno binu-l-Hasano bin Ahmado bin Jahja-l-Vatzikijo [nepo de la precipa rolulo de la novelo] diris :

Mia avo [Abu-l-Hasano Ahmado ibnu Muhammado-l-Vatzikijo (m. 906), policestro en Bagdado sub la ĥalifateco de Al-Muktafijo bi-l-Laho (m. 908)] estis policestro en Bagdado sub Al-Muktafijo bi-l-Laho. Dum lia estrado prosperis al la ŝtelistoj frapanta fiaĵo. La komercistoj kunveniĝis kaj plendis al Al-Muktafijo bi-l-Laho pri tio. Tiu ĉi devigis mian avon aŭ prezenti la ŝtelistojn aŭ pagi kompensan monsumon. Li konfuziĝis en tia grado, ke rajdante unuope li patroladis tage kaj nokte. Ĝis la tago, kiam li penetris en vakan strateton, en lima kvartalo de Bagdado. Rigardante de proksime, li malkovris, ke tie okazas abomenaĵoj. Tuj poste li trafis en senelirejon. Kaj vidis antaŭ la pordo de unu el la tieaj domoj grandegan fiŝan ostaraĵon, kun grandega spino, kiu lasis taksi la pezon de la fiŝo je cent ritloj [ritlo (aŭ ratlo), antikva pezunuo, kies ĝia bagdada valoro samvaloradis kiel proksimume 400 gramoj]. Li demandis al buĉisto de unu el la buĉejoj : « He, povrulo, vidante la ostaraĵon de ĉi fiŝo, je



kiom vi taksas ĝian prezon ? » Li respondis : « Je dinaro. » Li komentis : «La situacio de la loĝantoj de ĉi strateto ne ebligas al ili la aĉeton de fiŝo tia, kia tiu ĉi. Estas evidente kiamaniere la strateto estiĝis, en la proksimeco de la dezerto. Tie ne loĝas kiu ajn posedas ajnon, kion li timas perdi ; aŭ kiu ajn havas monon por loĝejaj elspezoj. Temas do ne alie ol pri nepre klarigenda krimego. » La buĉisto forĵetis lian konkludon, dirante : « Jen ideo tute neverŝajna ! » Al-Vatzikijo diris lin : « Serĉu virinon en ĉi strateto por ke mi parolu kun ŝi. » La buĉisto frapis al pordo alia ol tiu antaŭ kiu troviĝis la fiŝa ostaraĵo. Malfortika maljunulino eliris. Li petis akvon por trinki. Li ne ĉesis peti trinkaĵon post trinkaĵo nek la oldulino trinkigi ilin. Al-Vatzikijo intertempe informiĝis pri la strateto kaj ties loĝantaro ; kaj ŝi, senscia pri la konsekvencoj de ŝiaj diroj, informis lin pri tio. Ĝis tio, ke li demandis al ŝi, montrante per la mentono la domon antaŭ kies pordo li estis trovinta la fiŝan ostaraĵon : « Kaj tiu domo, kiu loĝas ene ? » Ŝi respondis : « Per Allaho, ni vere ne scias multe pri ĝiaj loĝantoj. Krom tio, ke tie estas kvin friponaspektaj junuloj, ŝajne komercistoj. Ili enloĝiĝis tie de unu monato. Ni nur malofte vidas ilin eliri tage. Kaj ni rimarkis, ke kiam unu el ili eliras pro ia afero, li rapidas reveni. Kaj dum la tuta tago ili restas kune, trinkantaj, manĝantaj kaj ludantaj ŝakojn aŭ triktrakon. Ili havas junan faktoton. Kiam noktiĝas, ili iras en domon, kiun ili posedas en Al-Karĥo [kvartalo de la merkatoj de la tiama Bagdado], lasante la junulon ĉi tie, por ke li gardu la domon. Kiam tagiĝas, ili revenas dum ni dormas, kaj pro tio ni ne konas la horon de ilia reveno. La policestro ĉesis peti trinkaĵojn kaj la oldulino rehejmeniĝis. Li tiam diris al sia akompananto : « Tio ĉio bone priskribas ŝtelistojn, ĉu ne ? » Kaj aldiris : « Okupiĝu pri la ĉirkaŭaĵoj de la domo, lasu al mi ĝian pordon ! ». Dirite, farite. Li sendis venigi dekon da homoj siaj, postenigis ilin sur la najbaraj terasoj, kaj frapis al la pordo. La juna faktoto venis kaj malfermis ĝin. Li eniris kun siaj homoj kaj neniu el la bandaĉo eskapis el ili. Li alkondukis ilin al la policejo kaj konfesigis ilin. Ili estis ja la kulpuloj mem de la frapanta krimego. Ili montris siajn kunkulpulojn, ĉiujn kiujn Al-Vatzikijo arestis. Li fieradis pri ĉi historio.

Ibnu al-Ĝaŭzijo, Libro de la inteligentuloj,
Jacob Hasbun, membro de EBG, elarabigis

# POEMARO

## La Unua Amo en Juneco

Ho, junec', ho junec',
Pensoj flugas al junul',
Danci, kanti, volas mi,
Mi sentas feliĉon kun li.
Janĉo amas min,
Mi ankaŭ amas lin,
Ni serĉadas, vagadas kaj kisadas…
… Sed mi miras-Janĉo plu ne venas!
Mi sole promenas en parko.
Subite mi ekaŭdas lian voĉon-
Ha!, mia kara junulo en parko!
Mi kaŝe iras laŭ vojet'
Kiu estas plena je ŝtonet'.
Surprizo: apud li sidas ĉarma junulin'!
Sur la benko kuŝas bukedo da roz'…
Janĉo karesas kaj kisas ŝin!
Mi volas ekkrii:
"Virinet', vi devas tuj foriri!
For, for, fremda virinet'!
Janĉo estas mia!
Tio jam ne estas sekret'."
Sed mi ne krias: staras muta.
Mia Janĉo estas fripono tuta!
Larmoj falas el okuloj amaraj, salaj,
Pro malamo vangoj fariĝas palaj.
Subite mi rememoras eldiron jenan:
La unua amo en junec'
Similas al aŭtuna la unua neĝet'":
Blanka neĝo falas sur la ter',
Sed kurta estas ĝia blankec',
Ĉar baldaŭ ĝi degelas kaj vaporas.
Mi estas malserena pro rompita amo-
Nur estas eterna, blua maro.
La unua amo en junec' degelas
Same kiel la unua neĝet'.
Ĉu mi devas longe
Pro rompita amo priplori?
Tamen mi volus iomete ĝin glori.

Emīlija Vāvere, 4-07-2006, Riga, Latvujo




Poetino Emīlija Vāvere, kun diplomo de sukcesa partoprenanto en arta konkurso Muzo 2010 dum 46aj Baltiaj E-Tagoj en Visaginas, Litovujo, 26 junio-3 julio 2010.

## Al Vi
## (songa soneto)

Foriras la suno. La nokto, venas
kun la plumba pluvo el larmoj- ploro
de forkuro; kaj, inter nubvaporo,
alia formo de vivo alvenas.

Foriras l' tago kaj mi jam sentplenas
pro la horoj sen sunlumo; l' angoro
de la nenio plena de langvoro
en l' ĉiela mistero, min ĉagrenas.

Alvenis l' nokto. De l' perdita suno
mi sentas l' vakuon; melankolia
malhelo, en ĉi tiu noktaŭtuno

invadas mian penson. Ironia
sorĉo fandigas, kun la lumo- luno,
vian animon kun l' animo mia.

Alberto Garcia Orive, 6-2010, Hispanujo



## Komitato de UEA elektis

La Komitato de UEA povis efike eklabori en sia unua kunsido en Havano sabaton, la 17-an de julio, ĉar diference de kunsidoj eĉ en pluraj europaj UK-oj, ĝi havis kvorumon tuj je la komenco. Ĉeestis komence 26 komitatanoj; fine de la kunsido la nombro estis jam 36, nome 32 komitatanoj A, 3 komitatanoj B kaj unu intertempe elektita komitatano C.

La ĉefa tasko en la sabata kunsido estis la elektoj. La Komitato voĉdonis per sekreta baloto pri la proponoj de la Elekta Komisiono, kiujn ĝi ricevis jam en majo. Unue estis elektitaj komitatanoj C. Ĉiuj ses kandidatoj sukcesis en la voĉdonado. Por Loes Demmendaal voĉdonis 24, kontraŭ 1 kaj 2 sindetenis; Paulo Branco ricevis respektive 21, 4 kaj 1; Jean Codjo 20, 4 kaj 2; Josep Franquesa Sole 20, 5 kaj 1; Stefano Keller 20, 0 kaj 6; kaj Marcel Delforge 19, 1 kaj 6.

Sekvis la elekto de la Estraro por la periodo 2010-2013. Probal Dasgupta estis reelektita kiel prezidanto per 26 por, 2 kontraŭ kaj 4 sindetenoj. Claude Nourmont kiel vicprezidanto ricevis respektive 26, 4 kaj 2 voĉojn, kaj Barbara Pietrzak kiel ĝenerala sekretario per 27, 4 kaj 1 voĉoj. Same kiel antaŭe, Nourmont plu respondecos pri edukado, kulturo kaj kongresoj kaj Pietrzak pri informado. Loes Demmendaal reelektiĝis kiel estrarano pri financo kaj administrado per 28, 2 kaj 2 voĉoj. Tri estraranoj estas novaj: Maritza Gurierrez pri landa kaj regiona agado (resp. 26, 3, 3), Stefano Keller pri eksteraj rilatoj (24, 3, 5) kaj Amri Wandel pri scienca kaj faka agado (23, 5, 4). Kvankam ne en la tuj antaŭa periodo, Gutierrez estis estrarano jam pli frue dum unu mandato kaj Wandel dum du mandatoj.

Kiel komitataj reviziantoj estis elektitaj Paulo Branco kaj Marcel Delforge unuanime. Ambaŭ ricevis 29 porajn voĉojn; du sindetenis. Simile elektiĝis ankaŭ la membroj de la Financa Komisiono. Flory Witdoeckt ricevis 30 porajn voĉojn kun 1 sindeteno, Gianfranco Polerani resp. 29 kaj 2, kaj Josep Franquesa Sole 28 kaj 3.

Osmo Buller; Gazetaraj Komunikoj UEA; N-ro 389; 2010-07-18

## Centra Oficejo de UEA



Foto de la 10a de Julio 2010 en la Centra Oficejo de UEA, kun maldekstre dekstren, Pasquale Zapelli, Paulo Branco, Loes Demmendaal, Marcel Delforge, Osmo Buller, respektive Administranto, Komitata Revizianto, Estraranino pri Financo, Komitata Revizianto, Ĝenerala-Direktoro de UEA

## ST.PETERBURGA KONGRESO 25-31 Majo 2010



Sunan tagon fine de majo 2010 mi estis survoje al esperanto-kongreso 100-a jarjubilea de la unua rusa kongreso, kiu ankaŭ okazis en St Peterburgo. Unuhora flugado trans la Balta Maro. La arkipelago etendiĝas foren de la marbordo, insuletoj kaj pli grandaj insuloj, kiuj naĝas sur la brilanta akvosurfaco. Mirakla sento vidi la mondon tiel desupre kiel Nils Holgersson. Surteriĝas kaj ni senprobleme trairas la pasportan kontrolon.

**Ĉe la elirejo** staris kelkaj esperantistoj por akcepti nin kaj konduki nin per buseto longan vojon al nia hotelo, kiu situis en la sama domo kiel la kongresejo. La ĉambro por tri personoj estis kvazaŭ eta apartamento kun banĉambro kaj antaŭĉambro. Ekster tio estis alia ĉambro, kie oni povis sidi babili kaj manĝi la kunportitan matenmanĝon, kion ni ĉiun tagon faris. La tria persono en la ĉambro Tatyana el Ukraino ankoraŭ ne alvenis. Gunvor el Svedio kaj mi eliris por ekkonatiĝi kun la urbo, eble manĝeti. Ni trovis picrestoracion, pensis eniri, sed iris ankoraŭ kelkajn paŝojn al angulo de iu placo kaj ĉirkaŭrigardis. Iu virino alproksimiĝis kaj germanlingve demandis al ni, ĉu ni bezonas helpon ? Ni kompreneble rakontis ke ni vizitas esperantokongreson en la urbo. La virino rakontis, ke ŝi konis maljunan virinon, kiu nun mortis, sed kiu estis esperantistino. (Tiu estas Varvara Cvetkova, unu el la rusaj pioniroj, naskiĝis 1910, lernis esperanton 1928.). Ŝia filino estas tiu, kiu renkontis nin ĉe la flughaveno kaj estis LKK-ano de la kongreso. Unu el la ĉambroj de la kongreso portis la nomon de la patrino.

**Dum ni staris** ĉe la angulo de la placo parolante germane kun la virino iu de malantaŭe ĉirkaŭbrakis min. Estis Tatyana. Kia koincido ! Ŝi kaj tiu, kiu renkontis ŝin en la flughaveno ricevis eraran adreson al la hotelo, kiu havis la saman nomon, sed situis longe for de la ĵusta. Ŝi ankaŭ informis nin, ke la



korekta hotelo estas multe pli bona. Nun ni kun fiero montris la vojon al la korekta hotelo!

**Dum la unuaj tagoj** Tatyana gvidis nin en St Peterburgo kun ĉirkaŭaĵoj. Jam dum la unua vespero ni lernis kiel la Metro funkcias. Ni vagis tien kaj reen sur Nevski Prospekt por ekkoni ĝin kaj la domojn novpentritajn per bela pastelkoloroj. Kelkaj domoj estis tiel frandaj, ke oni volis ilin manĝi. Nevski Prospekt estis plurkilometra. Ambaŭflanke de la strato situas palacoj kaj butikgalerioj de la tempo, kiam fondiĝis la urbo. Meze de la longeco de la strato situas la impona memoraĵo pri la venko super Napoleon 1812. Antaŭ la peza granit-cirklo dancas la akvofontanoj en tiu ĉi « akvourbo ».

**Unu mateno**, kiam la suno brilis, pluvis sufiĉe multe dum nia semajno en St Peterburg, nia gvidantino gvidis nin al Peterhof. Ni boatvojaĝis en La Finna golfo vidis la ebenaĵon kaj la « akvolandon » sur kiu Petro la Granda ekkonstruis sian urbon 1703. Dum tiu suna tago ni vere ĝuis la miraklajn akvokaskadojn ĉirkaŭ la kastelo Peterhof – « La Granda Kaskado », « Piramid kaskado »,« La Ŝakluda akvofalo » ktp. Estis la lasta tago de la lernejo Ĉiuj knabinoj vestitaj en nigraj roboj kun blankaj antaŭtukoj, iliaj lernejaj uniformoj por festaj tagoj. La knaboj en kompletoj kun honor-rubendoj surbruste kun la lerneja nomo surskribita. Amaso da gejunuloj sed neniu "bruo". Kiam nia gvidantino demandis ion al ili, ili tre ĝentile respondis!

Neniu rubaĵo surgrunde. Oni purigis kaj balais tutan tempon. La purigistinoj ofte venis de pli foraj partoj de la regno. Ni ĝuis miraklan sunan tagon en la bela parko kun multaj malnovaj tilioj, kun ĉiuj artaj akvoludoj – kaj kun oraj tegmentoj kaj kupoloj.

**Denove** en la urbo ni albordiĝis apud La Ermitaĝo kun bluaj muroj kaj blanko ĉirkaŭ la fenestroj. La grandskala Palacplaco etendiĝis antaŭ ni. Ĝi vere donis senton da spaco. Ni manĝis en iu nova restoracio, Valhalla. Ni volis honori la malnovajn diojn de la nordia mitologio. Tatyana vere imponis min pri kiom ŝi konis pri la nordia mitologio. En la menuo estis skribita pri Aŭdhumla, mitologia bovino, kiam temis pri bifsteko, kaj Särimner, kiam oni elektu kotleton. Tatyana konis pri tiuj bestoj, certe ne multaj en Svedio konus tion.

**Dum nia restado** en la urbo, oni festis 307-jaran datrevenon de ĝia fondiĝo, oni festis la datrevenon de la naskiĝo de Peter la Granda kaj la mia. Ĉion ni festis per ĉampano kaj ĉokoladtorto. Dum la lasta semajnfino de majo la urbo plene festis sur stratoj kaj placoj. Ŝvarmis multege da homoj, kaj ankaŭ policistoj kaj fajrobrigadistoj. Ni promenis en bela vespera vetero inter ĉiuj homoj, ĝuis diversan modernan

muzikon. Subite ekpluvegis. Tamen la plej multaj restis por partopreni la feston.
Nian lastan nokton ni ĝuis en boato sub la 500 pontoj de St Peterburgo. Estis bela vetero, tiel ke ni vere povis vidi la blankan nokton, eĉ ni vidis kiel la brilo de plena luno rebrilis sur la oraj tegmentoj kaj kupoloj. Estas vere fabela urbo. La delikataj turoj de Peter Paŭl fortikaĵo dominis la komencon de la boatvojaĝo. Ni pasis la imponan Isakkatedralon kaj la kolorplenan katedralon de Releviĝo.
Popolmuzikistoj kaj dancistoj regalis per bela programo sur la boato. La tutan nokton oni plenigis niajn glasojn de rusa ĉampano.
**Dum la lastaj tagoj** en St Peterburgo okazis la 100-jaran jubilean kongreson. Do mi diligente partoprenis la programon, aŭskultis prelegojn, ĝuis muzikon kaj teatraĵojn. La temo de la kongreso estis "esperanto kiel ilo por popola demokratio". Renato Corsetti rakontis kiel esperantistoj dum la 1-a mondmilito peris kontakton inter familianoj kiuj perdis kontakton dum ili fuĝis aŭ estis deportitaj. Oni ankaŭ rakontis kiel esperanto pli malpli grandskale laboris pri diversaj helplaboroj diversloke en la mondo. Valeriana Chetkova rakontis pri kiom da radioelsendaĵoj okasis en Eŭropo esperantlingve dum la 20- 30- aj jaroj dum la 20-a jarcento. Povus esti ĝis 100 ĉiutage antaŭ ol la diktatoroj fermis la kontinenton por kontakto inter homoj. La granda teatroevento estis dupersona serba teatrogrupo, kiu prezentis teatraĵon pri Postnikov kaj Zamenhof dum dek eventoplenaj tagoj. Postnikov, kiu estis militisto kaj kritikis la esperantajn ideojn ŝanĝis siajn pensojn kaj mem disvastigis la ideojn de Zamenhof kaj daŭrigis liajn agadojn. Li mem estis punita dum la nigraj jaroj kiuj venus.
La memorkoncerto de Ĵormat kaj Nataŝa en la grupo de multaj rusoj estis kvazaŭ sankta travivaĵo.
Sabate antaŭtagmeze mi kun kelkaj aliaj de la kongreso estis invitita al artisto kiu laboris dum pluraj jaroj kaj faris multajn diversspecajn artaĵojn. Li faris grandajn muralpentraĵojn kaj portretojn, poste li pentras akvarelojn nonfiruratvajn.
Iun vesperon ni kelkope ĝuis belegan prezentadon de « Cignolago » la belega baleto de Ĉajkovski, belega prezentado kun lertaj rusaj gedancistoj. Granda travivaĵo spekti tion en St Peterburgo.
**Katerina**, nova amikino, akompanis nin al la flughaveno bonŝance por ni. Post tiu eventoplena semajno ni vicestaris por trairi la malfacilan sekureckontrolon. Oni devas demeti parton de siaj vestoj, ŝuojn, monon, por kontroli ĉu oni estas kvalifikita eliri la landon. Ni havis agrablan vojaĝon super Stockholma arkipelago.
**Bedaŭrinde** mi sukcesis importi kun mi bakteriojn de la « Rusa malvarmumo ». Longe mi batalis kontraŭ tiuj fortaj bakterioj.

Kerstin Rohdin, Stokolmo, Svedujo
18-06-2010 ; k.rohdin(ĉe)home.se



## KUKO 2010
### KUrso por KOmencantoj

Ĉu vi jam deziris lerni internacian lingvon, kiel ESPERANTON ? La esperantista grupo de la universitata urbo Loveno-la-Nova (Belgio, proksime al Bruselo) organizas 25 horojn de intensivaj kursoj pri ESPERANTO la 16-an/17-an kaj la 23-an/24-an de oktobro 2010. Pasintjare, la partoprenantoj venis el Belgio, Francio kaj Germanio. Por pliaj informoj : bv skribi al ademarque@skynet.be aŭ tel al 0032 10 412925, André Demarque, Membro de EBG.
En oktobro 2010, okazos la dua KUKO. En oktobro kaj novembro 2009, en Loveno-la-Nova (Belgujo) , Esperanto-Kvinfolio la esperantista grupo de la universitata urbo organizis sian unuan KUKOn (25 horojn de KUrso por KOmencantoj). La partoprenantoj venis el tri landoj (Germanio, Belgio, Francio). Tri instuistoj gvidis la kursojn : Françoise Pellegrin (instruistino en la EBG, Esperantista Brusela Grupo), Alexandre Baudry (nuntempe volontulo ĉe TEJO en Roterdamo) kaj André Demarque (tiaepoke prezidanto de la Esperantista grupo de Loveno-la-Nova).

### KIO ESTAS K U K O ?
Internacia intensiva KUrso por KOmencantoj kaj KOmencintoj

### KIAM ?
25 horoj dum du sinsekvaj semajnfinoj : sabaton la 16-an – dimanĉon la 17-an kaj sabaton la 23-an - dimanĉon la 24-an de Oktobro 2010 (la kurso komenciĝas sabate je la 10a kaj dimanĉe je la 9a / ĝi finiĝas sabate je la 18a kaj dimanĉe je la 17a).

### KIEL ?
per rekta metodo : oni parolos nur Esperante dum la kursoj. Dum la lastaj tri horoj, ni vizitos la universitatan urbon Louvain-la-Neuve (Loveno-la-Nova), pri kiu nia grupo tradukis gvidlibron en Esperanton.

### POR KIU ?
ĉar ni uzas rektan metodon, la kurso tute taŭgas por la ne-franclingvanoj. Tiuj ĉi estas bonvenegaj : ni esperas vidi ilin multnombraj, ĉar tio devigas nin uzi nur Esperanton, kaj tio liberigas eĉ la komencantojn, kiuj kuraĝas paroli esperante. Ni esperas vidi ankaŭ studentojn de la universitato.

### DE KIU organizita ?
De Esperanto-Kvinfolio, esperantista grupo de la universitata urbo Louvain-la-Neuve (Belgujo)

### KIOM KOSTAS ?
Unua varianto nur por la 25 horoj de kurso, ni petas 75 eŭrojn (30 eŭrojn por la studentoj aŭ la gejunulojn de malpli ol 26 jaraj) por pagi libron, luprenon de la kunvenejo, la fotokopiaĵojn kaj alian didaktikan ilaron, la gvidlibron pri la urbo (en Esperanto), la kafon aŭ alian trinkaĵon kaj KUKOjn (!) dum la paŭzoj… Dua varianto por la

kursoj + la vespermanĝoj (sabate), la tranokto (sabate) kaj la surlokaj movoj, ni petas 140 Eŭrojn (60 por la studentoj aŭ gejunuloj). Pri la tagmanĝo, estas tre facile en universitata urbo trovi malmultekostan manĝon.

**KIE ?**

En Louvain-la-Neuve, kie estas la plej grava franclingvana universitato de Belgujo. Ĝi situas 20 kilometrojn sud-oriente de Bruselo. Ĝi estas tre facile atingebla el Bruselo per trajno : ni sendos al vi horaron de la trajnoj kaj mapon de la urbo. Ni klarigos kiel atingi la urbon per veturilo kaj kie parkumi.

**Aliaj demandoj aŭ petoj ?**

**Aliĝo ?**

→ **ademarque@skynet.be** aŭ 0032 10 412925 de André Demarque, administranto de E-Kvinfolio, esperantista grupo de la universitata urbo, kaj membro de EBG - Esperantista Brusela Grupo

---

## ALIĜILO AL KUKO 2010


**Sendu vian aliĝilon al** ademarque@skynet.be
(por unu persono)
Familia Nomo :
Persona Nomo :
Naskiĝdato :
Ino/malino :
Retadreso :
Poŝtadreso :
Kion vi elektas ? 1 aŭ 2 ?
(vi forstreku tion, kio ne taŭgas):
1-aŭ nur la kursoj = 75 € (30 € studentoj)
2-aŭ kursoj + estado = 140 € (60 € studentoj)
**(vespermanĝo sabate+tranokt +surlokaj movoj)**
**Konto : 979-6251016-50 de E-Kvinfolio**
**(IBAN BE86 9796 2510 1650 BIC ARSPBE22)**



ESPERANTO-KVINFOLIO, la esperantista grupo de la universitata urbo Loveno-la-Nova (Belgujo) invitas vin al sia dua **KUKO** … (= **KU**rso por **KO**mencantoj)…

## 25 HOROJ de INTENSIVA KURSO por KOMENCANTOJ

→ por KOMENCA/INTOJ el Belgio, Nederlando, Germanio, Francio kaj el iu ajn lando.
→ dum du sinsekvaj semajnfinoj : la 16an-17an kaj la 23an-24an de Oktobro 2010
→ en la universitata urbo Loveno-la-Nova, proksime al Bruselo



…certas ke vi frandos nian KUKOn

*Por pliaj informoj (en Esperanto, en la franca, en la nederlanda kaj en la germana), skribu al*

**ademarque@skynet.be**

André Demarque, membro de EBG - Esperantista Brusela Grupo



## ULANBATORA AZIA KONGRESO

Estimataj gekongresanoj:
Kiel organizanto de tiu ĉi kongreso mi ne kuraĝas diri, ke la 6-a Azia Kongreso de Esperanto estis plene sukcesa sed mi diru, ke la kongreso estis aplaŭdinda. Tra tiu ĉi kongreso kion ni gajnis?

**Unue**, ni aziaj esperantistoj retrovis nian potencialan forton, kiun ni havas; kiel kunlabori inter aziaj esperantistoj, kiel organizi kongreson kaj kiel plekti kongresajn programerojn.

**Due**, KAEM, kiu estis fondita antaŭ 16 jaroj, sufiĉe enradikiĝis en la koro de aziaj esperantistoj. Oni pritaksas, ke KAEM estas unu el la kompetentaj kontinentaj komisionoj kadre de UEA. Gvidate unue de Puramo CHONG, Takeuti kaj poste Hori, KAEM kreskis ĝis hodiaŭ senpaŭze.

**Trie**, ni aziaj esperantistoj mem rimarkis, ke altigi lingvo-kapablon de Esperanto estas necese por enviciĝi en la internacian skalan Esperanto-movadon.

**Kvare**, tra tiu ĉi kongreso ni gajnis novajn samideanojn ne nur en Azio sed ekster Azio, kiuj venis al Mongolio por flari aziecan esperanto-etoson kaj kulturon. Aparte mi esprimas mian koregan dankon al la neaziaj esperantistoj, kiuj riĉigis tiun ĉi kongresajn programerojn.

**Ĉu ni vidu** kio okazis dum la kongreso? 32 fakaj kunsidoj, pri Esperanto, movado, literaturo, religio, junulara movado, kaligrafio, konversacio, mongola kulturo, nacia kaj internacia vesperoj kaj ĝia lingvo eĉ faka kunsido 'tablo-teniso', kiuj okazis dum 5 tagoj.

**Krome**, buntaj artaj aranĝoj, oratora konkurso, aŭkcio por la viktimoj en Haitio kaj ekskursoj ĝojigis nin.

**Estimataj** gekongresanoj: Tra tiu ĉi kongreso, ni renkontis la pionirojn de Mongola Esperanto-movado : Khayankhirvaa, Rinĉen kaj Dogsuren, kiuj semis Esperanton en Mongolio. Ili vere sopirus dum sia vivo vidi hodiaŭan renkontiĝon de verduloj en sia patrujo. Mi firme kredas, ke ili estu ĝojaj kaj feliĉaj rigardante tiun ĉi kongreson sur la ĉiela regno.

**La 7-a** Azia kongreso de Esperanto okazos en Israelo en la jaro 2013. Simbole tio diras, ke Azia movado migradas de ekstrema oriento al ekstrema okcidento, kio povos esti festo en la okcidenta parto de Azio.

**Dume**, nove elektita teamo de KAEM gvidota de prof SASAKI Teruhiro estas sufiĉe fortika por progresigi Azian movadon. Por verdigi Azion, ni senpaŭze antaŭen marŝu kaj bonvolu diri al viaj geamikoj tiel, ke la 6-a Azia Kongreso de Esperanto estis fruktplena kaj amuza. Koran dankon.

2010 LEE Jung-Kee (Prezidanto de KAEM)
la 23-an de junio ; esperanto(ĉe)saluton.net

## MI KONGRESIS EN RUSIO



Estis mia deziro viziti Rusion, okazis tiun ĉi jaron la 26a Rusia Esperanta Kongreso en Sankt Peterburgo kaj la postkongreso en Moskvo. Do kiam mi trovis anoncon de tiu ĉi renkontiĝo mi tuj aliĝis ĉar mi havis tial maniere la okazon viziti la landon kaj partopreni en alia esperanta aranĝo kiu estas por mi ĉiam plezuro.

Mi foriris el Bolonjo kun grupeto de ses italoj per aviadilo ĝis Sankt Peterburgo la 26an de majo. Mi mendis hoteleton proksime de la kongresejo, je 15 minutoj per metroo; la unuan tagon ne estis programo, do mi aldonis al paro de Ĉehoj por promeni iomete proksime de la hotelo; la sekvan tagon estis la solena malfermo de la kongreso kun parolado de la organizantoj: ili diris ke ĉi tiun jaron aliĝis al rusa kongreso personoj el proksimume 14 diversaj landoj, malsame ol kutime, ni estis pli ol 200 kongresanoj, estis ankaŭ koncertoj, teatraĵoj kaj mi salutis ĉiujn partoprenantojn per kelkaj vortoj, same faris aliaj eksterlandanoj. La sekvajn tagojn mi partoprenis en kvar ekskursoj: la unuan tagon ni iris en Sankta Petro kaj Paŭlo fortikaĵo kaj ni faris rondiron tra la urbo per buso; la duan tagon ni estis en Peterhofo kaj ĝia parko (la somera rezidejo de la caroj). La palaco posedas multnombrajn ĉambrojn, de tiuj ĉi mi preferas la dancan ĉambron en baroka stilo kun grekaj kaj romanaj pentraĵoj, faritaj de italaj artistoj kaj la tronan halon, la plej granda halo en klasika stilo, koncerne la parko ni povis miri fontanojn kun ŝercoj kaj ĝardenojn plenajn de buntaj floroj. La tria tago estis dediĉita al la vizito de Ermitaĝo kiu estas dividita en tri etaĵoj kaj en vintra palaco, malgranda, granda kaj nova Ermitaĝo kaj en ili estas artverkoj el diversaj landoj kaj periodoj; vespere estis ekskurso per ŝipo sur la rivero Neva kun popolaj kantoj kaj muziko. Per ĉi tiuj ekskursoj mi havis eblecon koni la plej gravajn monumentojn kaj la antikvajn belecojn de Sankt Peterburgo kaj iomete de historio de ĉi tiu lando. Koncerne la programo de la kongreso mi spektis unu prelegon, kelkajn koncertojn kaj teatran prezenton: "Dek tagoj de Kapitano Postnikov" (vere interesa teatraĵo). La lastan tagon matene estis la solena fermo de la kongreso en kiu denove mi faris komenteton pri mia restado en Sankt Peterburgo, postagmeze mi promenis laŭ unu el la plej famaj stratoj, Nevskij avenuo kie situas ankaŭ la hotelo en kiu mi loĝis. Mi estis ankaŭ en Nevskij placo, tielnomata en honoro de Alexander



Nevskij, venkinto de la batalo inter Rusoj kaj Svedoj.

**Por la postkongreso**, la 31an de majo nokte grupo de 20 personoj vojaĝis el Sankt Peterburgo per trajno ĝis Moskvo. La unuan tagon estis planita vizito al Ruĝa Placo, al Maneĝo, al Aleksandrovskij Ĝardeno, al Teatra Placo, al Katedralo de Kristo la Savinto kaj al granda magazeno GUM kie estas vendejoj pri la modo el diversaj landoj. Vespere okazis ekskurso laŭ la lineo de la Moskva Metroo, la plej granda certe en Eŭropo, eble ankaŭ en la mondo, kaj kiu estas plena de artaj verkoj. La duan tagon ni vizitis la Kremlon, la Endormiĝan Katedralon kaj promenis tra la stratoj Malnova kaj Nova Arbat (en la centro de la urbo). Vespere estis organizita renkontiĝo kun moskvaj esperantistoj de la Universitato: do estis malgranda prelego, koncertoj, kaj teumado kune. La trian tagon ni iris ĉe la Novvirgulina monaĥinejo kaj ĉe la memortombejo kie estas entombiĝitaj artistoj, sciencistoj, politikistoj, literaturistoj, poste estis promenado tra la malnovaj stratetoj de la urba centro. La kvaran tagon estis vizito de la kvartalo Ostankino kaj veturo per solrela supra metroo; postagmeze estis interesa kaj originala afero: la vizito de la Muzeo de Astronaŭtiko, do ni povis ensorbiĝi nin en la pli moderna areo de la urbo. La kvinan tagon estis vizito de la fama bildgalerio Tretjakov kie estas artverkoj de la mezepoka ĝis la dudeka jarcento; poste ni promenis en la Parko de la Venko kie estas multaj monumentoj pri la mondmilita epoko. La sesan tagon estis la forveturo de Moskvo al niaj domoj. Koncerne la manĝaĵoj ni iris en tradiciaj kafejoj kie ni gustumis la rusan kuirarton, kaj ĉiu vizito estis kondukata de moskva ĉiĉerono kiu parolis esperante.

Do mi povas diri ke ankaŭ la postkongreso en Moskvo estis vere bela sperto por mi ĉar mi esploris ĉi tiun urbon riĉa de historio kaj samtempe de teknologio; mi estis plene kontenta pri la manĝoj; mi renkontis viglajn kaj simpatiajn rusojn ( mi faris ankaŭ novajn amikecojn); la restado estis organizita precize kaj efikece. Konklude mi ne adiaŭis Rusion, sed mi diris ĝis revido.

Paola Tosato, Padova, Italujo, 12-07-2010

---

## BICIKLU NI

Aldone mi sendas informon el la revuo de Chemin du Rail por bicikla ekskurso dimanĉe la **19an de septembro de 2010.**

Bona ideo el varba vidpunkto por Esperanto estus ke ni per miksa grupo de esperantistoj (valonaj-flandraj) partoprenus biciklopromenojn organizitajn de alia asocio kiel tiu de Chemins du Rail, retpoŝte < info (ĉe) cheminsdurail.be >; telefono 081-657 596 de kiu mi estas membro. Plejofte iliaj ekskursoj foriris ekde iu stacidomo eĉ kelkfoje en Flandrujo ekzemple okazis jam en Kortrijk, do ĉiuj povas atingi la lokon kun kunportita biciklo. Se vi konas aliajn esperantistojn biciklo-geamikojn volonte pludonu la informojn.

Kun afablaj salutoj,

Herman Deceuninck
Dumviva membro de EBG

Karaj geamikoj,
Dimanĉon la 19an de septembro "Chemins du Rail" invitas vin al bicikla promeno de plimalpli 47 kilometroj por malkovri belegan kamparan regionon sur la tutnova "verda" bicikla vojo "Ravel". Poste ni biciklos direkten "Lobbes" sur la bicikla vojo L109 (malnova fervoja linio) kaj poste per "Ravel" numero 3 direkten "Erquelinnes". Posttagmeze ni biciklos direkten de bicikla vojo "Ravel" en konstruado L(inio)108. Ni haltos ankaŭ en "Bonne Espérance" (Bona Espero). Membroj de "Chemins du Rail" pagas surloke 1 € kaj ne-membroj 1,5 €. Estos agrable se multaj esperantistoj povos partopreni la biciklan ekskurson portante Esperanto-T-ĉemizon!
Jen la programo de la tago:

**9h15: rendevuo en la stacidomo de Binche**
**9h30: ekiro**
**11h00: mallonga paŭzo en Lobbes**
**12h30: alveno al Erquelinnes en la stacidomo, kadre de manifestacioj okaze de 175 jaroj da fervojo en Belgio. Paŭzo, libera manĝo (haveblos malgrandaj pladoj).**
**14h30: daŭrigo de la ekskurso**
**15h30: mallonga paŭzo en la Abatejo de "Bonne Espérance" (Bona espero)**
**16h30: reiro al la stacidomo de Binche**

Por scii kiom da homoj principe volas partopreni (oni neniam scias la veteron antaŭe), bonvole simple respondi retmesaĝe al FEL, Flandra Esperanto Ligo <esperanto-info (ĉe)esperanto.be>, kaj skribu kun kiom da homoj vi partoprenos. Eble ni povos kune veturi tien per trajno aŭ aŭto.
Dankon!

Herman/Catherine/Lode (FEL)

## Fotaĵoj de Esperantaj Eventoj
## Vespermanĝo EBG en Restoracio Rugantino 23/06



Lernantoj kaj aliaj klubanoj, 22 partoprenantoj, komune vespermanĝis kun gaja etoso en restoracio Rugantino por festi la finon de la lernjaro. Fotoj en retpaĝaro: *xurb.110mb.com*



## 46aj Baltiaj E-Tagoj en Visaginas 26/06-3/07








## KLARIGOJ PRI LA FOTAĴOJ

**Baltiaj Esperantaj Tagoj (BET) en Visaginas, Litovujo**, ses fotoj en antaŭa paĝo: 1-solena inaŭguro; 2-organizantaro en solena fermo; 3-grupa foto; 4-tuttaga ekskurso; 5-vizito de atomcentralo en Ignalina simila al tia de Ĉernobilo; 6-Cwik prelegas.
**Rusia Kongreso en St.Peterburgo eksa Leningrado**: ĉi-paĝe, du grupaj fotoj, inaŭgura kaj ferma.
**Rusia Postkongreso en Moskvo**:sekvanta paĝo, ses fotoj de grupo.
**6a Azia Kongreso** en Ulanbatoro, ĉefurbo de Mongolio:grupa foto.
**Beneluksa Kongreso en Antverpeno**: prelegoj de Flory Witdoeckt kaj Brian Moon en postsekvanta paĝo.

---

## RUSIA KONGRESO EN ST.PETERBURGO 25-31/05









## RUSIA POSTKONGRESO EN MOSKVO 1-7/06




## TUTAZIA KONGRESO EN ULANBATORO 19-23/06



## BENELUKSA KONGRESO EN ANTVERPENO 13-16/05








Bildoj de birdoj kaj insektoj

## JOSÉ AUGUSTO PINTO DE SOUSA



Membro de EBG, eŭropeista poligloto kaj tradukisto en la Konsilio de Ministroj de Eŭropa Unio